# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Decembro 2003 | MENSUEL/MONATA | 74-a jaro, n-ro 12 (1182)

ISSN 1163.0442 | 5 €

*Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem*

**http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesper@noos.fr**


## *SAT AKTIVE PARTOPRENIS EN EŬROPA SOCIA FORUMO*







*Supra foto: Granda banderolo de SAT en la franca, sur placo de Bastilo.*
*Suba foto: En la defileo ni portis videble la vorton - ESPERANTO.* *Fotis: K. Barkoviĉ*

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**


# El la redaktejo...



*Karaj,*
*vi tenas en la manoj la lastan numeron 2003. En ĝi vi trovos multajn interesajn informojn pri la aktiveco de via Asocio. Espereble tio instigos vin al ankoraŭ pli granda subteno kaj aktivado kadre de SAT.*
*Aliĝu al la venontjara kongreso en Bratislava. Frua aliĝo helpas al la OKK. Ne atendu la lastan momenton.*
*Aĉetu librojn kaj diskonigu ilin (vidu liston apude!). La tria tasko de SAT estas klerigi siajn membrojn pere de valoraj eldonaĵoj. Se ili ne estas legataj, ili estas morta kapitalo. Jen do belaj donacoj okaze de jarfinaj festoj.*
*Okaze de la jarŝanĝo mi deziras al ĉiuj el vi sanon kaj pacon por povi normale aktivi laŭ la celoj de SAT.*
*Kore via,*
*Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55, Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

**SAT-LIBROLISTO**



| TITOLO | | PREZO en Eŭroj | |
|---|---|---|---|
| Communication linguistique | | 4,60 | |
| Diction. de poche | | 4,30 | |
| Diction. pratique | | 23,00 | |
| Grand Dict. Esp. Fran. | | 23,00 | |
| Historio de SAT | | 4,60 | |
| Infanoj de la malriĉuloj | | 4,60 | |
| Interesa arkeologio | | 4,60 | |
| Japanaj vintraj fabeloj | | 7,00 | |
| Junulkurso | | 6,10 | |
| Junulkurso-kasedo | | 6,90 | |
| Komentoj al Komunista manifesto | | 1,25 | |
| Komentoj JK-francaj | | 1,25 | |
| Komentoj JK-hispanaj | | 1,25 | |
| Kristanismo kaj patriotismo | | 1,25 | |
| La fremdulo | | 9,15 | (nova) |
| La kolektiveco | | 6,10 | |
| Laborista movado Esperantista antaŭ mondmilito | | 1,25 | |
| Lanti pri sennaciismo | | 1,25 | |
| Manifesto de sennaciistoj | | 1,25 | |
| Natura nutrado | | 1,25 | |
| Ne plu ludo | | 3,80 | |
| Nia teatro | | 1,25 | |
| Nouveau Cours Rat. | (bind.) | 9,50 | |
| Nouveau Cours Rat. | (broŝ.) | 8,40 | |
| Nouveau Cours Rat. Kasedo | | 6,90 | |
| Nuna stato de evoluismo | | 2,80 | |
| Petro | | 1,50 | |
| PIV | | 40,00 | |
| Nova PIV | | 70,00 | |
| Poemo de plugisto | | 1,25 | |
| Profeto | | 1,25 | |
| PV | | 23,00 | |
| Revolucio de Ĉinio | | 3,80 | |
| SAT-ana anĝelo | | 6,10 | |
| Scienco kaj pseŭdoscienco pri heredoj kaj raso | | 1,25 | |
| Sepmil tagoj en Siberio | | 22,00 | |
| Skizo de ekonomia... | | 2,30 | |
| Une humanité, une langue | | 2,30 | |
| Universalismo | | 10,00 | (nova) |
| Vivo de Lanti | | 11,50 | |
| Vojo al scienco de estonto | | 1,25 | |
| Vortoj de kamarado Lanti | | 2,80 | |
| Vualo de l'Silento | | 10,70 | (nova) |
| Ĉu socialisma libereco ... | | 1,25 | |

**Por libroservoj jena rabato :**
PIV kaj eldonoj de SAT-Amikaro : 25 %
Aliaj SAT-eldonoj : 30 %

Por mendoj el la landoj de Eŭropa komunumo ni devas fakturi francan takson **se ili ne posedas numeron AVI.**

AĈETU

KAJ

LEGU

SAT-ELDONAĴOJN

***

TROVU JARFINAN DONACON POR VIAJ AMIKOJ

***

SAT VIVAS KAJ AKTIVAS DANKE AL VIAJ AĈETOJ



ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

# Kelkaj pridiskutindaj herezaĵoj pri la estonteco de SAT

*Jen pripensoj de nia juna kamarado kiu deziras provoki diskuton pri la estonto kaj pri liaj proponoj. Ni invitas vin ĉiujn reagi kaj esprimiĝi antaŭ nia kongreso en Bratislavo. Viaj reagoj aperos en venontaj numeroj de Sennaciulo kaj servos kiel bazo por la kongresa debato.*

*La redakcio*

SAT celas ebligi al siaj membroj elekti la plej taŭgan vojon por forkonduki la homaron al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo, per anstataŭigo de la nuna fia kaj fuŝa sociordo per alia bazita sur la jena principo, entenata en la universale malrespektata deklaracio pri homaj rajtoj : ĉiu homo ricevu tion, kion li bezonas por dece vivi, tio estas sufiĉa manĝaĵo, varma loko por dormi, ebleco sin kuraci kaj ebleco kleriĝi. Ne necesas longe prelegi pri la nuna monda situacio por konstati, ke tio ankoraŭ ne okazas en iu ajn lando. Pri tio kulpas la liberalisma-kapitalisma sistemo, kiu detruas nian planedon je la nomo de profito. Pri tio ankaŭ kulpas ĉiuj, kiuj akceptas tiun situacion, kaj faras nenion por ŝanĝi ĝin. La plej terura afero estas, ke ni nun disponas pri ĉiuj teĥnikaj rimedoj por havigi al ĉiu homo la elementajn necesaĵojn, pri kiuj mi parolis pli supre. Sed oni preferas forĵeti nevenditajn fruktojn ol donaci ilin al homoj, kiuj ne kapablas pagi. Tio ŝanĝiĝos nur post kiam okazos du gravaj revolucioj (tio estas drastaj ŝanĝegoj). La unua estas transiro de kapitalismo al vera anarĥia komunismo, kiu estis la komuna celo de ĉiuj maldekstruloj, almenaŭ dum la dua duono de la deknaŭa jarcento. Sed la historio pruvis, ke tiu ĉi revolucio estos ebla nur post la transformiĝo de la homa menso. Kiam ni ĉiuj komprenos, ke ni pli gajnos per kunlaboro ol per ĉikanado kaj militoj, la homaro estos savita. Por tio tute ne necesus forigi el la homa spirito la kverelemon, la egoismon, la kruelecon, la masoĥismon kaj ĉiujn imageblajn malvirtojn, kiujn Sigmund Freŭdo nomis « mortigaj instinktoj ». Kant humure asertis, ke eĉ la plej fiaj homoj povus vivi pace, kondiĉe ke ili estu inteligentaj. Kaj jen venas la tasko por ni SAT-anoj : komprenigi al ĉiuj fiuloj en la mondo, ke eĉ ili estos pli feliĉaj en socialisma mondo.

Por tion komprenigi al ili, necesus tamen scii, kion ni nomas « socialismo » aŭ « alia mondo », se uzi la nun laŭmodan esprimon. Kaj ĉefe necesus scii kiel starigi tiun pli bonan mondon. Ofte mi havas la impreson, ke la nunaj progresemaj organizoj multe batalas kontraŭ la nuna sociordo, sed ne proponas verajn konkretajn solvojn al la problemoj. Ĉiuokaze ekzistas amaso da organizoj kaj individuoj, kiuj iel klopodegas por plibonigi la mondon, sed ili ofte ne estas efikaj, ĉar ili ne konas aŭ ignoras siajn alitendencajn samcelanojn.

Kiel konkrete ŝanĝi la nunan mondon ? Jen la demando, kiun mi longe faris al mi mem kaj al aliaj homoj, sen iam ricevi kontentigan respondon. Mi nun konvinkiĝis, ke ni atingos neniun rezulton per uzo de perforto. Tion pruvis la dramaj eventoj de la dudeka jarcento: se ni estos tro indulgaj kun niaj malamikoj, ili mortigos nin, kiel okazis dum la Pariza Komunumo. Por venki ilin, ni devos esti pli fiaj ol ili, sed tiam nia venko estos tiu de barbareco, kaj ne de socialismo. La nura alia solvo estas edukado de la homoj, por ke ĉiuj bone komprenu, ke ili havas komunajn interesojn. Ŝajnas al mi, ke tiu dua vojo estas perfekte difinita per la unua paragrafo de la statuto de SAT. Do, kial ĉiuj progresemuloj ne kuregas al ni ? Ofte pro nescio, ofte ankaŭ, ĉar ili ne komprenas, kiel SAT povus plenumi sian statutan celon. Kaj evidente ne estas facile altiri homojn dirante al ili « venu al tiu mirinda asocio, per kiu eblus savi la mondon, se ni estus pli multnombraj kaj havus pli grandajn rimedojn ». Se ni vere volas sukcesi, ni devas pripensi por scii kion ni jam povas fari kun niaj limigitaj eblecoj. Kaj se ni tion faros vere taŭge, ni ne plu bezonos klopodi por altiri homojn. Ili venos propravole, pro la konstato, ke ni trovis la ĝustan vojon kaj komencis paŝi sur ĝi.

Do, konsentite, sed kion vi proponas, kara kamarado ? Unu el la ĉefaj trajtoj de nia mondo estas la superabundo de diversaj informoj. Teorie, ni facile povus esti informitaj pri ĉiuj okazaĵoj en la mondo, sed plej ofte ni ne scias, kie trovi la serĉatan informon. Mi mem, bonŝanculo, kiu studas en unu el la plej bonaj lernejoj de mia lando, kaj disponas pri mirinda kvanto da plej diversaj klerigiloj, tute ne kapablas precize respondi al la jenaj simplaj demandoj : kion bezonas la homaro, kion ni kapablas produkti, kaj kial la produktaĵoj ne alvenas al tiuj, kiuj bezonas ilin. Por tio mi bezonus ekvivalenton de PIV pri ekonomio kaj politiko. Por tio la plej racia rimedo estas la reto.

**Utileco de la reto**

1. Por starigi koheran kolekton da informoj, facile alireblan al ĉiuj, sub iuj kondiĉoj.

Informoj pri faktoj, kaj pri teorioj: kio estis jam provita por alvenigi la bezonaĵojn al la bezonantoj, kial tio ne funkciis. Alivorte ĉio necesa pri la ĝisnunaj politikaj kaj ekonomiaj sistemoj. Tia kolekto da informoj devus enteni ĉiujn necesajn informojn aŭ referencoj pri verkoj necesaj, por definitive ĉesigi ĉiujn polemikojn